


EKE



esperanto

**Kunveno: merkredon la 20an de marto 2019a
je la 20.00 h. en "De Uitwijk",
Generaal Pattonlaan 124, Eindhoven
tel. 040-2450590**

Kie vi naskiĝis?

Ĉi-monate *Jeannette* prizorgos por ni la programon. Ŝi ŝatus starigi al ni kelkajn demandojn pri la loko kie ni naskiĝis...

- ◆ En kiu lando vi naskiĝis?
- ◆ En kiu provinco aŭ regiono vi naskiĝis?
- ◆ En kiu loko vi naskiĝis?
- ◆ Ĉu vi naskiĝis en vilaĝo aŭ urbo?
- ◆ Kial vi naskiĝis tie?
- ◆ Ĉu vi povas diri ion pri la loko kie vi naskiĝis? Ĉu vi povus eble iom rakonti pri io aparta pri via naskiĝloko?
- ◆ Ĉu via naskiĝloko havis apartan nomon (eble eĉ nur dum certa periodo de la jaro)?
- ◆ Ĉu vi havas bildo(j)n; mapo(j)n, aŭ eble eĉ foto(j)n (de antaŭaj epokoj)?



Se vi havas bildojn diĝitajn: ni disponos pri komputilo kaj la projekciilo, do simplajn bildojn ni certe povos montri sur ekrano. Kunportu viajn foto(j)n kaj/aŭ mapo(j)n sur USB-memorilo...